

ĈU REVO AŬ FAKTO?

VERKIS DALIROR CHALUPA
TRADUKIS JIŘÍ V. ŠAMLA

PERSONOJ:

LI
ŜI
RADIOANONCANTOJ
VOĈO
DIVERSAJ VOĈOJ

RIMARKO:

Ni represas ĉi tiun radioludon, kiu estis la unuan fojon prezentita en la Verda stacio la 3-an de oktobro 1934, ĉar multaj samideanoj postulis de ni la alsendon de ĝia teksto. Ni volonte plenumas ilian peton ankaŭ pro tio, ĉar tiu-ĉi ludo ne devas esti uzata nur en la radio, sed ĝi povas bone servi kiel propaganda drameto, riĉiganta la programon de klubaj kunvenoj, aŭ - tradukita en nacian lingvon - ĝi povas esti enmetata en propagandvesperojn por Esperanto. La scenejo ne postulas grandan preparon: tablo, unu aŭ du apogseĝoj, tableto kun radioaparato. Malantaŭ la scenejo gramofono kaj la aktoroj prezentantaj la »voĉojn«. La gramofondiskojn oni povas elekti laŭplaĉe kaj laŭ ili ŝanĝi nature la koncernajn vortojn de la anoncanto. Same oni povas ŝanĝi je la fino la unuopajn reprezentantojn de la diversaj nacioj. Kaj ankoraŭ unu noton: la aŭtoran rajton ni cedas al la bono de la movado.

(Li kaj Ŝi aŭskultas radion):

Je gramofondisko: Mozart: - - finsonas iu simfonia komponaĵo. Poste anoncado:

Anoncanto: Halo, Radio Wien. Mit der Symphonie von Wolfgang Amadeus Mozart schliessen wir das Konzert der Wiener Symphoniker. Nach einer kurzen Pause spricht Dr Henz über den Rundfunk und das Geistesleben.

(Viena vekhorloĝo - paŭzosigno de la radiostacio.)

Ŝi: Kion li anoncis?

Li: Ke oni post mallanga paŭzo dissendos paroladon pri la radio kaj spirita vivo. Ĝi estos certe tre interesa. Ni aŭskultos, ĉu ne?

Ŝi: Aĥ ne, vi scias, kiel malmulte mi komprenas germane. Trovu prefere alian stacion, kie oni dissendas muzikon. Ekzemple Romon.

Li: Sed tio estas domaĝe - - -

Ŝi: Ĉu vi denove volas esti egoisma? Mi ĉiam devas aŭskulti nur tion, kio plaĉas al vi - -

Li: - - sed finfine devas ĉiam mi aŭskulti tion, kio plaĉas al vi.

Do, ĉi tie vi havas Romon.

(Gramofondisko: Caruso.)

Ŝi: Dio, tiu kantas! - - Se mi nur komprenus ankaŭ la vortojn. Mi tuj lernus itale!

Li: Vi devus lerni ankaŭ aliajn lingvojn. Atendu, mi kaptos alian stacion.

(Paŭzosigno de Praha, poste ĉeĥa anoncado.)

Anoncanto: Halo, Praha! Vyslámé rozhlasovou hru Požár v opeře od Jana Grmely.

(Gramofondisko ĝis la drame plej alta loko.)

Ŝi: Pro Dio, kio ĝi estas, kio okazas tie? Kvazaŭ iu akcidento estus okazinta. Eble on teatro. Fermu la aparaton! Tio estas terura!

(La gramofondisko silentiĝas.)

Li: Vidu, kaj vi timas pro tio, ke vi ne komprenis la anoncadon. El Praha oni ĵus elsendas

radioludon, kiu nomiĝas: Brulego en la operejo. Vi ekkonis nur laŭ la sonoj, ke okazis iu akcidento, sed ke tiu brulego estas ludata en ateliero, tion scias nur tiu, kiu komprenas ĉefe.

Ŝi: Antaŭ nelonge mi ankaŭ tiom ektimis. Tiam vi estis en kunveno. Mi ekfunkciigis la radion, mi eĉ ne scias, kia fremda stacio ĝi estis, kaj en tiu momento aŭdiĝas el la aparato io, kvazaŭ kriegantaj sovaĝaj bestoj kaj tuj poste malesperiga ĝemado de homoj. Unue mi ekideis, ke dum raportado el cirko venis la bestaro inter la publikon kaj vi scias, kiel mi sentis min. Sed ĝi estas mirinda! La homo estas tiom malproksime de la sendostacio, sed dum la dissendado li sentas la ludantojn kvazaŭ en sia loĝejo. Kaj mi tiam kun teruro atendis, ĉu el la ampliono ne elsaltos iu tigro. Kaj mi rapide fermis la radion.

Li: (ridante): Vi estas heroo. Vi certe timos, ke akvo superversos vian ĉambron, se vi ekaŭdos el la radio bruegantan maron sur gramofondisko. Kaj tiam la sovaĝaj bestoj estis certe ankaŭ sur disko kaj ili sendolore sufokis aktorojn en iu radiosceno.

Ŝi: Poste mi aŭdis ankoraŭ iun anoncadon, sed eĉ duonvorton mi ne kromprenis. Mi ne scias, ĉu ĝi estis angle aŭ dane aŭ svede.

Li: Tia ĝi estas, se oni ne komprenas fremdajn lingvojn.

Ŝi: Sed tio eĉ ne estas ebla. Kiom da lingvoj oni devus lerni, por kompreni almenaŭ la programojn de la stacioj, kiujn ni kaptas per nia kvarvalva aparato.

Li: Kaj kiel bone oni devus scii ilin. Ĉiu ĝojas, se li scias krom sia gepatra almenaŭ unu lingvon.

Ŝi: Sed tio denove estas nenio. Per unu eĉ per la plej grava lingvo vi ne povas iri ĉien.

Li: Do finfine restos nenio alia, ol la helpalfabeto de primitivuloj kaj de la surdmutaj: montri per la fingroj. Tiom antaŭen ni progresis en la dudeka jarcento.

Ŝi: Vidu, kaj pri mi vi miras kaj mokridas, ke mi en la radio volas aŭskulti el la fremdaj stacioj nenion alian ol muzikon. Kaj mi denove miras pri vi, ke vi kapablas aŭskulti paroladojn kaj ludojn ankaŭ en tiuj lingvoj, kiujn vi tute ne komprenas.

Li: Mi havas certan ĝuon de tio. Ĝi incitas min. Ŝajnas al mi iam, ke mi komprenas, sed ke mankas al mi nur ia sorĉa ŝlosilo, per kiu mi povus facile solvi la sekreton de ĉiuj lingvoj kaj landoj, per kiu ni fratigus ĉiujn popolojn, ke ili komprenu sin, ke estu nur homaro de bona volo kaj de paco sur la tero kaj neniam plu malamikaj nacioj.

(Malforte eksonas la Esperanto-himno sur disko.)

Ŝi: De kie sonas tiu muziko? Kiu ekfunkciigis la aparaton?

Li: Ĝi estas nekonata melodio, sed tamen io ligas min al ĝi.

(Recitado de la Esperanto-himno: sub ĝi senĉese sonas malforte la melodio.)

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
per flugiloj de facila vento
nun de loko flugu ĝi al loko.
Ne al glavo sangon soifanta
ĝi la homan tiras familion:
Al la mond' eterne militanta
ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l'Espero
kolektiĝas pacaj batalantoj,
kaj rapide kreskas la afero
per laboro de la Esperantoj.
Forte staras muroj de miljaroj
inter la popoloj dividitaj,
sed dissaltos la obstinaj baroj
per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
komprenante unu la alian,
la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro
en laboro paca ne laciĝos,
ĝis la bela sonĝo de l'Homaro
por eterna ben' efektiviĝos.

Li: Kiu vi estas, nekonato?

Voĉo: Mi estas via revo, kiu estas fariĝonta fakto.

Li: Ĉu mia revo?

Voĉo: Jes, revo kaj sopiro, kiun vi ĵus antaŭ momento estis dirinta. Vi diris: mankas al mi nur iu sorĉa ŝlosilo, per kiu mi facile solvus la sekreton de ĉiuj lingvoj kaj landoj, ke ili komprenu sin, ke estu nur homaro de bona volo kaj de paco sur la tero kaj neniam plu malamikaj nacioj - - - Ĉi tion mi volas efektivigi.

Li: Kiu vi estas, ke vi havas tian sopiron kaj kuraĝon?

Voĉo: Mi estas Esperanto!

Li kaj Ŝi: Es-pe-ran-to?

Voĉo: Venu inter nin, aliĝu al nia sekvantaro, kiu paŝas tra la tuta mondo. Vi ekkomprenos la amikojn el ĉiuj landoj kaj ŝtatoj kaj vi estos akceptitaj de ili en la esperantistan grandan rondon familian. Aŭdu iliajn voĉojn:

1. voĉo: Mi estas inĝeniero el Francio.

2. voĉo: Mi estas juĝisto el Danlando.

3. voĉo: Mi estas agrikulturisto el la Unuiĝintaj Sovetiaj Socialistaj Respublikoj.

4. voĉo: Mi estas profesoro el Ĉeĥoslovakio.

5. voĉo: Mi estas komercisto el Italio.

1. voĉo: Mi estas kuracisto el Germanio.

3. voĉo: Mi estas laboristo el la Unuiĝintaj ŝtatoj Nord-Amerikaj.

4. voĉo: Mi estas lokomotivestro el Aŭstrio.

(Gramofondisko - bruo de amaso da homoj.)

5. voĉo: Mi esbas studento el Finnlando.

Virina voĉo: Mi estas instruistino el Nederlando.

1. voĉo: Mi estas soldato el Polio.

2. voĉo: Mi estas bienisto el Rumanio.

(La disko plilaŭtiĝas.)

3. voĉo: Mi estas politikisto el Svisio.

Virina voĉo: Mi estas aktorino el Svedio.

4. voĉo: Mi estas radioanoncanto el Alĝerio.

5. voĉo: Mi estas muzikisto el Hispanio.

1. voĉo: Mi estas pastro el Litovio.

2. voĉo: Mi estas metiisto el Jugoslavio.

3. voĉo: Mi estas - - - -

(La voĉoj malaperas en la bruo.)

Voĉo (potence): Venu kun ni!

(Sonas la Esperanto-himno. Post la finiĝo gongo kaj himno nacia.)

Fino.

Elsendis Verda Stacio, 1934-10-03, la teksto apertis en la libro Verda Stacio, p. 73-78